

Historio kaj opinioj de Internacia Esperanto-*Sumoo*

Septembre 2024 estis la 15a datreveno de la Internacia Esperanto-*Sumoo*, kiu komenciĝis septembre 2009, kaj en novembro 2024 okazis la 90a *Sumoo*.

Kio estas *sumoo* ?

Certe multaj ankoraŭ ne scias, kio estas la *Sumoo*, kiu ne estas Esperanto-vorto. Tamen mi esperas, ke en Esperantujo la vorto « *Ssumoo* » estas relative bone kontata, ĉar jam 15 jaroj pasis, ekde kiam mi komencis okazigi la Internacian Esperanto-*Sumo*-on.



Sumo-o estas la nomo de unu el la japanaj tradiciaj lukto-artoĵoj. Vidu la dekstran foton. Du luktistoj luktas. Kiam unu luktisto faligas aŭ puŝas eksteren la alian luktiston, li venkas. La turneo okazas 6 fojojn jare po 15 tagoj, nome en januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. *Sumo*-o estas ŝatata de multaj japanoj, do multaj vidas ĝian televidelsendon posttagmeze.

Mi hontis pro tio, ke mi ne legis Esperanto-librojn

Kia rilato estas inter tiu *Sumo*-o kaj Esperanto- *Sumo*-o? Mi klarigos. Mi estas longjara esperantisto, sed antaŭ ol mi komencis organizi tiun Esperanto-*Sumo*-on, mi ĉiam hontis pro mia maldiligenteco pri legado de Esperanto-libroj. Tiun tempon mi estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto, kaj kiam okazis estrarana kunsido en ĝia oficejo en Tokio, mi ĉiam aĉetis plurajn Esperanto-librojn, kaj en la trajno mi malfermis la librojn kaj komencis legi ilin, sed mi tuj endormiĝis. Post kiam mi revenis

hejmen, tiuj libroj tuj kuŝis kaj endormiĝis en mia libroŝranko, kaj neniam vekigis. Mi tre hontis pro tio. Mi sciis, ke samo okazas al multaj esperantistoj. Se ni ne legas librojn, nia Esperanto-kapablo neniam altiĝas kaj la Esperanto-librokulturo velkas, nome nia senlegado signifas velkadon de Esperanto.

Tamen kiamaniere ni povos instigi min kaj esperantistojn legi librojn? Ĉu mi simple havigu al mi kaj al ili celon, ekzemple « legi 500 paĝojn dum unu jaro »? Iuj veteranaj esperantistoj provos legi tiom da kvanto, sed komencantaj esperantistoj neniam volas, nek provas. Kiamaniere mi povos instigi eĉ komencantojn legi librojn?

Mi rememoris iun instruiston de la angla lingvo

Tiam mi rememoris iun instruiston de la angla lingvo en mezlernejo, kiu havigis al siaj lernantoj memdeciditan celon en la ekzameneto de anglaj vortoj, nome malsaĝaj lernantoj rajtis havi celon de eĉ 1 poento el 10 poentoj, male saĝaj lernantoj kuraĝe rajtis havi celon de 10 poentoj. En ekzameneto, kiam tiuj malsaĝuloj gajnis unu poenton, ili ricevis unu venkon, ĉar ilia celo estis 1 poento, male kiam tiuj saĝuloj gajnis eĉ 9 poentojn, ili ricevis malvenkon, ĉar ilia celo estis 10 poentoj. Kutime malsaĝuloj neniam povas venki saĝulojn en ekzamenoj, sed en tiu sistemo eĉ malsaĝuloj povis venki saĝulojn. Sciante tion, tiuj malsaĝaj lernantoj komencis serioze prepari sin por ekzamenetoj. Tiu instruisto nomis tiun ekzamenetaron « *Sumo-o* de la anglalingva ekzameneto », kaj tiutempa sumoisto Koniŝiki el Havajo sendis gratulmesaĝojn al la instruisto kaj liaj lernantoj. Tion li raportis en la kunsido antaŭ 40 jaroj, kaj mi rememoris tion.

Tiu sistemo estis tre bona, egaligante ĉiujn. Kiam ili, ĉu malsaĝuloj kun malaltnivela celo aŭ ĉu saĝuloj kun altnivela celo, atingas sian celon, ili egale gajnas unu venkon. Plenumi la celon memdeciditan, ne truditan de alia homo, estas la plej grave. Rememorinte la manieron de tiu instruisto, mi enkondukis ĝin en Esperanto-*Sumo-on*.

Kio estas la sistemo en Esperanto-*Sumo-o*?

Partoprenantoj anoncas, ke ili legos iun libron dum la 15-taga *Sumo-o*-periodo, ekzemple, « Raportoj el Japanio 27, 3 paĝojn aŭ pli ĉiun tagon ». Veteranoj rajtas elekti malfacilan filozofian libron kun la promeso de 20 paĝoj kaj komencantoj rajtas elekti infanlibron kun la promeso de 1 paĝo. Kiam ili plenumas sian promeson en unu tago, ili gajnas unu venkon. Ambaŭ legantoj de filozofia libro kaj tiuj de

infanlibro egale ricevas unu venkon, kiam ili plenumas sian promeson. Tiamaniere veteranoj kaj komencantoj povas lukti en la sama « ringo », kaj kiam ili venkas 15 tagojn, ili ricevas diplomon fine de la *Sumo-o*-periodo. En tiu *Sumo-o* eĉ komencantoj povas venki veteranojn, do ili povas ĝoje partopreni.

Kiel *Sumo-o* komenciĝis kaj kio estas ĝia nuna stato?

Mi prove komencis okazigi *Sumo-on* septembre 2009 nur al japanoj. Komence partoprenis nur 10. Post du *Sumo-oj*, mi havis memfidon pri la sukceso, kaj malfermis *Sumo-on* al la mondo. Kaj poste pli kaj pli multiĝis partoprenantoj. Vi povas vidi la diagramon sube:

La pinto estis en julio 2017, antaŭ la Seula UK. La nombro kreskis preskaŭ ĝis 400, danke al multaj partoprenantoj el Koreio, sed poste koreoj perdis entuziasmon kaj multaj ĉesis partopreni en ĝi, do nun la nombro vagadas je malpli ol 300 el iom pli ol 35 landoj.

Konstante la plej multe partoprenas el Japanio, ĉirkaŭ 65, kaj Francio okupis la duan lokon, kaj sekvante ilin Ĉinio, Brazilo, Pollando, Germanio, Italio, Rusio, Britio, kaj lastatempe denove Koreio ktp. Unu fojon multaj partoprenis el Afriko, sed nun malmulte pro la ekonomia kaj politika problemoj, kaj la plej bedaŭrinde el Oceanio preskaŭ neniu partoprenas.

Resume el Azio plej multe partoprenas. S-ro Renato Corsetti ofte diras, ke venos tempo, kiam Azio estos la centro de Esperanto-movado. Li povas esti prava, sed mi timas, ke la japana movado maljuniĝis kaj en estonteco ne povos esti tiel multaj partoprenantoj el Japanio kiel nun.

Kiel mi administras la *Sumo-on*?

Estas ne eble kaj ne bone, ke nur mi administras *Sumo-on*. Nun mi havas pli ol 10 kunlaborantojn el diversaj landoj, kiuj arde subtenas *Sumo-on*. Ili respondecas pri 25 partoprenantoj, ricevante iliajn rezultojn ĉiun 5an tagon de *Sumo-o*-konkurso kaj resendas al ili kuraĝigajn vortojn. Unu polino prizorgas nian retejon (<http://www.esperanto-sumoo.pl/>) kaj



ankaŭ faras belan diplomon por perfektaj venkintoj. Ricevi tiun diplomon kun ĉiam malsamaj desegnaĵoj el talentaj partoprenantoj estas plezuro por multaj. Unu francino respondecas pri korektado de recenzoj senditaj de la partoprenantoj. Unu polo respondecas pri nove lanĉita Koresponda Servo inter sumoistoj. Tiuj rezultoj kaj recenzoj aperas en nia retejo.

Antaŭ la komenciĝo de la nova periodo de *Sumo-o*, mi faras liston de partoprenantoj laŭ la antaŭa rezulto. Perfektaj venkintoj kun 15 venkoj apartenas al la rango A, kaj tiuj, kiuj havis eĉ unu malvenkon aŭ ne partoprenis en la antaŭa *Sumo-o* apartenas al la rango B, la revenintoj, al la rango C, kaj la novuloj, al la rango D. Partoprenantoj ĝis la numero 150 en la rango A preskaŭ neniam malvenkas. Dum la *Sumo-o*-konkurso, ili vivas kun ĝi, neniam lasante sian libron el siaj manoj. Kiam mi ordigas la rezultojn kaj la liston, mi forte sentas ilian amon al Esperanto kaj daŭran progreson de Esperanto.

Sumoo multe kontribuas al la movado

Libroj longe kuŝantaj en ŝranko vekigis. Multaj partoprenantoj jam finlegis tiujn dormintajn librojn kaj aĉetas la novajn. Laŭ statistiko, unu partoprenanto legas meznombro 60 paĝojn dum unu *Sumo-o*-konkurso. Dum 15 jaroj ekde septembro 2009 ĝis septembro 2024 okazis 89 *Sumoo*-oj, kaj entute estis 20 136 partoprenoj (la nombro de la partoprenintoj eble estis 1200), do la legitaj paĝoj estas $60 \times 20\,136 = 1\,208\,160$ paĝoj (11 276 libroj kun 100 paĝoj).

Mi estas verkisto kaj eldonisto. Se esperantistoj ne legas miajn librojn,

mia verkista kaj eldonista laboro estas tute senutila. Mi estas certa, ke ankaŭ aliaj verkistoj ĝojas pro *Sumo-o*. Anna Lowenstein, Trevor Steele kaj Julian Modest estas tre ŝatataj verkistoj. Anna estas jam longe fervora partoprenanto.

Mi ne forgesu ankaŭ kreskon de solidara sento inter la partoprenantoj. Dum la *Sumo-o*-konkurso, la partoprenantoj rete babilas kun sia eksterlanda prizorganto, parolante pri la vetero, floroj en ĝardeno, familio ktp, sendante sian rezulton ĉiun 5an tagon. Tio estas tre interesa kaj instiga sperto por ambaŭ, tial la kunlaborantoj tre ĝoje laboras por la *Sumo-o*. La partoprenantoj ĉiam sentas, ke en la sama momento centoj da esperantistoj same diligente legas, plenumonte sian celon. Tio kreas solidaran kaj amikan senton inter ili.

***Sumo-o* estas grava mond-ŝanĝilo**

Por esperantistoj estu devo kaj ĝojo legi Esperanto-librojn. Sen legado via kapablo neniam altiĝas, nek povas vere ĝui Esperanton. Sen aĉeto de Esperanto-libroj Esperanto-kulturo velkas kaj fine malaperos. Dum mi faras liston de partoprenantoj kaj vidas, kiujn librojn ili legas, mi ĉiam miras. El 300 partoprenantoj 270 homoj legas malsamajn librojn. Tio signifas, ke en la Esperantujo ekzistas abundegaj libroj, kiujn niaj antaŭuloj verkis kaj eldonis en la pasintaj 150 jaroj. Tio estas gravega kultura heredaĵo de Esperanto. Se ni ne tuŝus tiun abundecon, ĉu ni povus nomi nin esperantistoj?

Tamen konstante legi Esperanto-librojn estas malfacile, ĉar Esperanto estas “eksterlanda” lingvo kaj ni devas lerni ĝin. Homoj estas esence maldiligentaj, do ili ĉiam preparas pretekston por eviti legadon, ekzemple, okupiteco. Tamen pro okupiteco, ĉu ni rajtas ne legi Esperanto-librojn kiel sinceraj esperantistoj? Tute ne. Esperantistoj estas mond-ŝanĝantoj.

Kial ni elektis Esperanton, ne la anglan? Certe ni estis impresitaj de Homaranismo de d-ro Zamenhof. Ĉu ni ne komencis lerni Esperanton por efektiviĝi tian mondon, kie homoj vivas pace, egale kaj feliĉe? Ne forgesu nian gravan motivon komenci lerni Esperanton. *Sumo-o* estas kreita por okupitaj sed maldiligentaj homoj kiel ni. Partoprenante en *Sumo-on*, ni ŝanĝu nian vivmanieron, la Esperanto-movadon kaj celu ŝanĝi la mondon.

Sumo-o estas la plej granda leg-movado en la historio de la homaro, danke al interreto kaj danke al Esperanto. Ĝi havas gravegan historian mision por ŝanĝi la mondon pli pacen kaj pli egalen. Partoprenante en ĝi, ni povas dediĉi nin al tiu sankta misio.

Sumo-o ne estas simpla leg-konkurso, sed grava mond-ŝanĝilo.

Miaj personaj rememoroj pri Sumoo

Multajn jarojn mi prizorgis *Sumo*-on, dume mi havas multajn neforgesebkajn rememorojn.

1. Subite malaperinta prizorganto

En la komencaj kelkaj jaroj iu viro en Serbio kunlaboris. Li ne skribis al mi multe, sed diligente plenumis sian laboron, sed iun tempon li ĉesis sendi mesaĝon al mi. Mi timis, ke li malsaniĝis aŭ plej malfeliĉe li mortis. Mi sendis al serbaj partoprenantoj pri li, sed neniu konis lin. Mi havis neniu rimedon trovi lin, do mi rezignis serĉi lin. Mi ne memoras, kiel li kontaktis min. Certe li estis soleca esperantisto, tamen ĝuis labori por *Sumo*-o.

2. Malsaniĝo estas la plej granda malhelpilo

Kio malhelpas partoprenon al *Sumo*-o, tio estas malsaniĝo. Iu japanino estis fervora esperantistino kaj partoprenadis en *Sumo*-o. Sed ŝi eksuferis pro kancero. Fojfoje ŝi enhospitaliĝis kaj kuraciĝis. Ĉiam ŝi diligente legis kaj ĉiam gajnis 15 venkojn, sed post la suferigo pro kancero, ŝia rezulto ne estis stabila. Kiam ŝi sendis al mi malvenkojn, mi timis, ke ŝi denove malsaniĝis. Tia stato daŭris kelkajn *Sumo*-o-konkurosojn, kaj fine ŝi ne partoprenis kaj poste mortis. Kiam komenciĝas *Sumo*-o, mi ĉiam rememoras ŝin. Malsaniĝo estas la plaj granda malhelpo por *Sumo*-o, do mi kaj vi prizorgu min kaj vin por ke ni povu longe partoprenu en *Sumo*-o.

3. Ploreganta knabineto

Gelernantoj de La Chaux-de-Fonds, Svislando, partoprenadis, prizorgate de instruistino s-ino Monika Molnar. En la komencaj jaroj iu knabineto, eble 8-jara, revenis hejmen por feriado, sed ŝi rimarkis, ke ŝi forgesis la libron en la lernejo. Ŝi panikiĝis kaj ploregis. Ŝia patrino surprizite tuj telefonis al Monika, kiu tuj sendis la kopion de la paĝoj fakse al la patrino. Kiel la knabino trankviliĝis kaj dankante legis la kopion! Certe tiu okazaĵo restos ankoraŭ nun en ŝia koro kaj kuraĝigas ŝin.

Mi supozas, ke partopreno en *Sumo*-o donas al la gelernantoj bonan edukon, ĉar ili mem decidas sian celon kaj plemumadas ĝin, disciplinante sin. La sistemo de *Sumo*-o povas esti tre utila ne nur en edukado, sed ankaŭ en aliaj kampoj.

Kompare kun tiu knabino, multaj plenkreskaj *Sumo*-istoj facile rompas al si faritan promeson. Mi ne povas detale scii, kio igas ilin rompi la promeson, sed per iliaj malvenkoj mi povas vidi ilianjn karakteron kaj vivmanieron.

4. Mi povis legi 50 librojn el PVZ

Japano Itoo Kanĵi kompletis Plenan Verkaron de L.L.Zamenhof, kiu konsistas el pli ol 50 dikaj libroj. Mi aĉetis ĝin kontraŭ multege da mono kiel devo, ĉar mi estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto. Tamen la libroj longe kuŝis en mia ĉambro, neniam tuŝite. Kiam mi komencis *Sumo-on*, mi decidis legi ĉiujn, kaj post kelkaj jaroj mi sukcesis je tio. Sen *Sumo-o* mi neniam legus ilin. Mi fieras, ke eble nur Itoo kaj mi legis ĉiujn librojn. Danke al *Sumo-o* mi sentas, ke mi fariĝis vera esperantisto.

5. Prizorgantoj havas profitojn

Mi prizorgadas *Sumo-on* dum 15 jaroj. Por tio mi devas labori multe, uzante mian tempon kaj energion, sed pli ol tiuj malfaciloj, mi ricevas pli grandajn profitojn, kompreneble ne financajn.

1. Mi havas multajn konatojn en la mondo. Ĝis nun ebl 1200 homoj partoprenis en la 90 *Sumo-oj*. Tiuj homoj sendis sian aliĝon rete al mi, do mi havas tiom da retadresoj. Ili estas mia trezoro.

En *Sumo-o* ĉirkaŭ 200 homoj estas konstantaj partoprenantoj tre fidelaj, kun kiuj mi povas ricevi kaj sendi diversajn informojn. Esperanto estas tre utila en kolektado de informoj. Ekzemple, post la ukraina milito mi kolektas opiniojn pri ĝi. Ĉar mi havas multajn retadresojn kaj certe mia retadreso troviĝas ankaŭ ĉe ili, venas multaj informoj. Dum tiuj du jaroj mi kolektadas kaj dissendadas informojn el la mondo al 300 *Sumo-istoj*. Ja mi havas 2000 retadresojn, sed sendi al ĉiuj estas tro da ĝenoj, do mi dissendas nur al *Sumo-istoj*, ĉar ili ŝatas legi kaj estas fidndaj. Sen *Sumo-o*, mi ne povus konatiĝi kun tiom da sinceraj esperantistoj kaj ne povus fari diversajn agadojn, kiujn mi nun faras per Esperanto. Sen Esperanto-*Sumo-o*, mi ne povus havi tiun ĉi riĉan vivon. Mi vere dankas al *Sumo-o*, mia genia inventaĵo.

Mi estas la plej granda profitanto, sed ankaŭ aliaj prizorgantoj ĝoje laboras por *Sumo-o*, ĉar ĝi donas al ili diversajn profitojn. Certe ili havas sian rakonton pri *Sumo-o*.

Plano de la *Sumo-o* en 2025 kaj 2026:

La 91a *Sumo-o*: la 12a de januaro - la 26a de januaro

La 92a *Sumo-o*: la 9a de marto - la 23a de marto

La 93a *Sumo-o*: la 11a de majo - la 25a de majo

La 94a *Sumo-o*: la 13a de julio - la 27a de julio

La 95a *Sumo-o*: la 14a de septembro - la 28a de septembro

La 96a *Sumo-o* o: la 9a de novembro - la 23a de novembro

La 97a *Sumo-o*: januaro

La 98a *Sumo-o*: marto

La 99a *Sumo*-o: majo

La 100a *Sumo*-o: julio

Aliĝmaniero:

Sendu vian datumon al Hori Jasuo laŭ la suba ekzemplo:

Horizonto (s-ro HORI Jasuo, Maebaŝi, Gunma, Japanio,

horizonto@r.water.sannet.ne.jp)

„For la batalilojn!“ verkita de Bertha von Suttner. Ĉiutage 10 paĝoj.

Pli da informo : Vizitu nian retejon: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Opinoj de *Sumo*-istoj

1. Aleksander Zdechlik (Pollando)

Kiam mi eksciis pri Esperanto-Sumo de Hori Jasuo, mi ne traktis la aranĝon serioze.

Unua mia demando estis, kiu kaj kiel kontrolos mian legadon? Respondo de Hori estis, ke neniu Vin kontrolos. Post la respondo sekvis mia rido. Kio signifas, ke neniu? Mi estis al kutimiĝinta, ke ĉie kaj ĉiam en mia lando estas kontrolo. Mi longe jam vivis en socialisma Pollando kaj vivo sen kontrolo estis io nenormala.

Venis alia mia demando, kio okazos, se mi iom trompe dirus al Hori, ke mi legis sed verdire mi ne legis. Respondo de Hori estis jena: vi vere trompos vin, ne min. Mi post la respondo komencis legi, tio signifas, partopreni la aranĝon, ĉar diri ne al mia amiko estis laŭ mi neĝusta.

Pasis iom da tempo mi rimarkis, ke ne estas en la aranĝo premioj kaj mi komprenis, ke pro tio ne estis bezonata kontrolo. Sed ĉu vere ne estis premio? Post kelkaj aranĝoj mi ion rimarkis. Unue mi imarkis, ke iam aĉetitaj libroj, kiuj kuŝis trankvile sur breto kaj estis ne legitaj, iom post iom ŝanĝis sian staton je legitaj.

Komence mi opinis, ke mia lingvoscio estas jam sufiĉe alta sed mia opinio estis erara. Legante mi rimarkis, ke multajn vortojn mi ne konas kaj mi devis uzi vortaron por kompreni ilin. Nun mi opinias, ke danke al Esperanto-Sumoo mia lingvoscio pliboniĝis kaj vere tio estas por mi la premio. Se mi hodiaŭ lernus alian lingvon, mi uzus metodon de Esperanto-Sumoo por plibonigi mian lingvonivelon. Dankon al la kreinto de Esperanto-Sumoo.

2. Monto Daijuu (Japanio)

Mia sumoo-vivo

Kiam mi unuan fojon partoprenis en la Japana Esperanto-Kongreso okazinta en la gubernio Jamanaŝi en oktobro 2009, mi aŭdis homojn salutantajn per la vortoj “Gratulon pro via perfekta venko en Sumoo”. Kiam mi revenis al mia hejmloko, mi demandis en nia Esperanto-kunsido s-ron Arai pri tio. Li respondis, “Temis pri Esperanto-Sumoo. Se vi volas partopreni, mi donos al vi ĉi tiun libron”, kaj li donis al mi la libron “Raportoj el Japanio 10” verkitan de s-ro Hori. S-ro Arai jam partoprenis en Sumoo, kiu komenciĝis en septembro en la sama jaro.

Mi havis grandan intereson pri tiu Sumoo kaj ekde la novembro Sumoo ĝis nun mi daŭre partoprenas en ĝi kaj dum tiuj 15 jaroj mi neniam interrompis la partoprenon. Dum tiuj jaroj iun tempon mi ne fartis bone, alian tempon mi devis vojaĝi kaj alian tempon mi grimpis sur altan monton, sed mi ĉiam trovis tempon por legi, en trajno, en monta kabano

sub poŝlampa lumoj kaj eĉ en malsana lito.

Raportoj el Japanio, verkita de s-ro Hori

Kiel mi menciis komence, mia unua libro estis “Raportoj el Japanio 10”. Tiam mi estis vere komencanto, sed ekde la komenco mi promesis al mi legi unu raporton ĉiutage. Tiam tiu tasko estis tro malfacila por mi. Mi legis de frumatene, plu legis post tagmanĝo, kaj finis legi malfrue en la nokto. Mi bezonis proksimume 8 horojn. Krome, ĉiufoje, kiam mi trovis vortojn, kiujn mi ne komprenis, mi faris vortkartojn kaj portis ilin kun mi, kaj post tri jaroj la skatolo fariĝis plena. Mia edzo miris kaj demandis: Ĉu ĉiuj kondutas same kiel vi?” Kvankam mi rimarkis, ke mi donis al mi tro altan celon en la unua Sumoo, mi ne volis malaltigi ĝin. Tamen pro mia ĝisnuna lernado lastatempe mi povas legi la promesitan kvanton en unu horo kaj duono. Post la 60-a Sumoo mi povis kompreni la frazon rekte en mia kapo, ne tradukante ĝin en la japanan lingvon.

S-ro Hori skribis, “Daŭri verki ĉiujare ‘Raportojn el Japanio’ estas kontribuo al mondpaco.” Kvankam mi ne povas fari tian grandan laboron, mi kredas, ke legi liajn verkojn sen salti eĉ unu paĝon estas mia malgranda kontribuo al paco. Mi legis la serion “Raportoj el Japanio” ĝis la plej nova volumo 27 sen pretersalti iujn. Kiam okazis la Granda Orient-Japana Tertremo en marto 2011, mi estis tiel subpremita, sed mi faris mian plejblon por ne forturniĝi de Sumoo. Mi povas fini la legadon de “Raportoj el Japanio 15”, 450-paĝa libro, kiu temis pri la Tertremo, en 2 Sumoo-periodoj. Dank' al Sumoo mi povis legi ankaŭ multajn aliajn librojn. Mi ŝatus prezenti librojn, kiuj lasis impreson al mi.

Pri la libroj, kiujn mi legis

Mi ekinteresiĝis pri Esperanto pro japana verkisto Mijazaŭa Kenĵi, esperantisto, do mi legis ĉiujn liajn verkojn tradukitajn en Esperanton, kiel “Gooŝ, la violonĉelisto” kaj “Nokto sur la Galaksia Fervojo”. Mi sentas, ke la Esperanto-traduko estas pli facile komprenebla ol la originalo.

“Silento” verkita de Endoo Ŝuusaku estis tre malfacile komprenebla, do mi pruntis la japanan version el la biblioteko kaj legis ambaŭ, sed mi ankoraŭ ne komprenas multon el ili.

La Esperanto-traduko de s-ino Doi Ĉieko de “Pordego” verkita de Nacume Sooseki estis leginda.

Kiam mi legis “Oku no Hosomiĉi” (Vojeto de orienta Japanio), eseo de hajkisto Baŝoo en Edo-epoko, tradukitan de s-ro Sasaki Teruhiro, kiun mi neniam legus, se mi ne estus renkontinta Sumoon, mi pleniĝis de dankemo al Sumoo.

Mi eklegis “Fabelojn de Andersen”, onidire rakontojn por infanoj, tradukitajn de Zamenhof, sed la frazoj estis longaj kaj mi malfacile legis

ilin. Ĉu la Esperanto-traduko ne estas pli malfacila ol la originalo? Simile mi sentas, ke "Eta Princo" estas pli malfacila rakonto en la Esperanto-traduko. Mi profundigas mian scion pri ĉi tiuj rakontoj en kunsido kun mia amikino s-ino Tai. Estas tre amuze legi kune.

Mi ankaŭ legis la "Taglibron" de Anne Frank kun la japana versio.

Mi ankaŭ amas la librojn de Julian Modest, kiuj estas facile legeblaj kaj havas tre altan kvaliton.

Mia politiko en Sumoo estas finlegi ĉiujn librojn kaj poste skribi recenzojn. Mia forpasinta amiko s-ro Nikki iam diris al mi, "Se vi metos Esperanto-librojn unu sur la alian, kiujn vi legos, kaj tiu libro-turo fariĝos tiel alta kiel vi, vi povas nomi vin kiel altnivela esperantisto. Mi scivolas, ĉu mi povis legi tiom?"

Subteno al mia nepo Kjuuta

Iun tagon mia nepo Kjuuta diris al mi, "Sumoo ŝajnas interesa. Se Avnjo estas la 3-a en la rango A, mi estos la plej juna sumooisto en la mondo." Li diris tion en julio antaŭ 3 jaroj. Li estas 9-jara, kaj li ĵus komencis lerni anglan alfabeton. Mi rekomendis, ke li voĉlegu Esperanto-librojn "20 Jaroj de Mi kaj Panjo" verkitan de Jamamoto Akiko, "Ezopo Epizodo 50", "Ivan, la malsaĝulo" kaj "Eta Princo". Mi pensis, ke ne estus interese, se li ne komprenus la signifon, do mi montris la tradukon antaŭ lia voĉlego. Li tiamaniere partoprenis en Sumoo, sed li ĉesos partopreni en 2025, ĉar li eniros en mezlernejon kaj li estos okupita pro diversaj agadoj krom studado. Li ricevis multe da kuraĝigoj de s-ro Hori.

Mi dankas al la prizorgantoj

Mi povis konatiĝi kun multaj prizorgantoj. Kiam mi elektis "Taglibron" de Anne Frank, iu prizorganto skribis, "Vi elektis la plej bonan libron." Ankaŭ la vjetnama prizorganto s-ro Ha sendis al mi intimajn retmesaĝojn. Mi ankaŭ havas belajn memorojn pri s-ro Moĉizuki kaj s-ro Kitagaŭa, kiuj laboris en la fruaj jaroj. Lastatempe, s-ino Tomida Narumi sendis al Kjuuta tre belan mesaĝon de kuraĝigo.

Konklude

1. Danke al Esperanto-Sumoo, mi progresis multe en Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj mi tradukis la proletan novelon "Krabŝipo" verkitan de Kobajaŝi Takiĝi, kun s-ro Hori. Tiu laboro multe superis mian Esperanto-kapablon, sed kuraĝigite de s-ro Hori mi povis plenumi mian multjaran revon. Tio estis la rezulto de mia renkonto kun s-ro Hori kaj mia profunda fido al li.

2. Mi tre ŝatis legi, sed se mi ne partoprenus en Sumoo, mi ne povus renkonti tiel riĉan Esperanto-literaturon.

3. Antaŭe mi estis maldiligenta en dommastrumado kaj sociaj agadoj, sed strange, post kiam mi partoprenis en Sumoo, mi fariĝis tre diligenta en ĉiuj aferoj.

4. Mi fariĝis tre sana. Mi kredas, ke Sumoo sanigis min, ĉar mi ĉiam uzas mian cerbon, legante librojn skribitajn en "fremda lingvo".

5. Mi havas multajn amikojn enlande kaj eksterlande, danke al Sumoo.

3. JU (Britujo)

Mi ĉiam ĝojegas partopreni en la sumoo. Dum la legado mi sentis min kontaktita kun aliaj Esperantistoj tra la mondo, kiam mi uzas nian komunan lingvon.

Koran dankon pro via organizado kaj pro la amika kaj akceptema etoso kiun vi kreas!

4. Ma (Britujo)

Mi ĉiam antaŭĝojas partopreni en la tutmonda leg-movadon, kaj mi kore dankas HORI Jasuo pro la mirinda etoso, kiun li estigas per sendi karajn tekstojn kaj bildojn.

Kore danke,

5. Pietro Fernandes Coelho Santos (Brazilo)

Mi kredas, ke la ideo de Esperanto-sumoo estas tre bona, ĉar ni povas havi stimulon por legi verkojn aŭ aliajn tekstojn. Sed mi opinias, ke tiu estas tro soleca sperto. Mi ŝatus partopreni en iu virtuala grupo (ĉe Fejsbuko, Whatsapp...), kie oni parolas pri la libroj, kiujn oni legas, scii iom pli pri tiu komunumo, kiu partoprenas en la evento. Mi preferus eĉ ke la evento havus 10 "verajn homojn", kiujn mi povus koni kaj kiuj partoprenis aktive en virtuala grupo, maniere ke mi povus scii, kiu libro ili legas, kial li elektis siajn librojn, kiel malfacila estas la sperto por bone daŭrigi sian legadon, kiu libro ili ŝatus legi estontece ktp. Mi sentas preskaŭ kiel la sola Esperanto-sumoo luktisto, ĉar, ĝenerale, mi ĝiuste havas kontakton kun vi kaj mia prizorganto (kvankam la kvanto de partoprenantoj estas pli ol 300 homoj). Mi kredas, ke ni povus havi pli da kontakto kaj konversacioj pri literaturo ktp, ĉe virtuala grupo (kiu estas multe pli interesa ol korespondi retpoŝte kun unu aŭ du partoprenantoj - kvankam la ideo de koresponda servo estas jam tre bona ideo).

P.S.: mi forĝesis diri ke estus tre bona ideo ke la evento havu kontojn eke sociaj retoj kiel Fejsbuko, Instagramo, Twitter ktp, por ke la evento povus esti plibone disvastigita, speciale inter la junuloj

6. Ronaldo (Germanio)

Kara s-ro Hori, mi ja jam plurfoje emfazis, ke mi danku al vi pro la grandega laboro. Via projekto estas preskaŭ la unusola por instigi min al legado de nefakaj libroj. Do, mi tre fieras por estis membro en la granda Sumoo-familio!

Bv. daŭrigi! Restu sana!!! Amike,

7. Edson (Brazilo)

Esperanto-Sumoo estas por mi mirinda programo, kiu per legado riĉigas mian vivon, plibonigas mian legadon kaj komprenkapablon. Mi dankas ĝian kreinton s-ro Hori Jasuo.

8. Enrico (Italio)

La esperanta Sumoo, laŭ mi, estas tre interesa kaj bona ideo. Ĝi kreas liberan komunumon por legi kion vi elektas sed kun minimuma tasko komuna por ĉiuj: deklari kiom da paĝoj vi sindevigas legi po tage dum dekkvin tagoj. Tio sufiĉas por senti sin kunligita ideo al la aliaj sumooanoj, dissemitaj en la tuta mondo, danke al nia amata lingvo esperanto. Mi ne scias se estas similaj vere internaciaj grupoj, kiuj uzas etnajn lingvojn. Mi konas grupeton, ĉi tie kie mi loĝas en Italio, kie la grupanoj elektas libron, kompreneble en la itala, kiun ĉiuj devas aĉeti aŭ pruntedoni kaj ili devas legi dum fiksita periodo; fine, ili parolas kune pri la libro, pri kio al ili plaĉis ktp: laŭ mi, la partopreno al tiu grupo estas multe pli malfacila.

Dankegon al la estimata Hori Jazuo kiu organizas kaj sekvas la tutan aferon!"

Korajn salutojn, kara Hori

9. Valerij (Rusio)

Mi partoprenas en la Sumoo jam multe da jaroj kaj neniam malvenkis. Amike kaj bondezire,

10. Flegistino (Ĉeĥio)

Mi opinias tre tre pozitive. Pri la Voĉo el mondo mi rekomendus al skribantoj dediĉi pli al esperantaj aferoj, ol al politikaj.

11. Nebulino (Finnlando)

La lego-evento Esperanta Sumoo al mi estas utila. Mi konatiĝas kun novaj libroj, lernas novajn vortojn, ne lasas mian lingvoscion forgesiĝi. En mia proksima ĉirkaŭaĵo mi ja ne havas la oportunon interparoli en

Esperanto. Mi kredas, ke la SUMOO utilas ankaŭ al UEA kaj al Esperanto ĝenerale. La konkursantoj aĉetadas librojn. Kelkaj el ni certe ankaŭ parolas pri Esperanta literaturo kaj pri nia ŝatokupo al konatuloj, leteramikoj kaj fremduloj. La ideo iniciati la Esperantan Sumoon estis tre bonvena. Mi dankas ĉiujn, kiuj kunlaboras por ĝi, ĉar por unu persono la laboro estus troa, malebla, ĉar tio bezonas multan tempon, akuratecon, sciojn pri la uzo de la iloj en la cifereca mondo. Dankeme

12. Anne (Britio)

Kara Sumo-estro Hori

Dankon pro la bildo de viaj belaj ciklamenoj en la belaj sakoj. Mi nur volis montri al vi mian ciklamenon kiu bone floras momente, sed gxi nur logxas en potu. Kaj vi povas vidi ke iom da negxo falis cxi-tie en norda Britio dum la nokto.

Mi skribos denove kun miaj opinioj pri La Sumo-o. Mallonge - mi alte taksas la sxancon partopreni, per gxi mi legis multajn librojn kaj tre gxoas la sperton.

Amike kaj dankeme,

13. Lalao (Francio)

Sumoo igis min pli ofte legi en Esperanto. Mi ofte laŭtlegas por pli bone asimili agrablajn sonojn. Sumoo estas bonega maniero progresi en lernado de Esperanto.

14. Jivanio (Kolombio)

Mi estas el Kolombio kaj mi loĝas en Bogoto. Mia profesio estas diplomita lingva instruistino (hispana, angla kaj franca, sed mi atendis malsanujio demandoj lastaj jaroj).

Kvankam mi eklernis Esperanton pasintjare kun Esperanto-amikoj el Brazilo, Eŭropo kaj instruisto el Ĉinio... ĝuste en la lasta semestro mi, dankon al tiu ĉi sumoo, mi renkontas aliajn partoprenantojn el la tuta mondo.

Mi malkovris ĉi tiun belan ŝancon pro rekuniĝo kun legado por plezuro. Estis ankaŭ instigo komenci legadon en Esperanto. Estas bela ŝanco renkontiĝi kaj kunhavigi scion kaj subtenon inter malsamaj kulturoj. Ĝi ankaŭ fariĝis parto de miaj terapioj, kiel paciento kun Multobla Sklerozo.

15. Viviane (Belgio)

Bonan tagon el Belgio, Sinjoro Hori.

Mi estas tre kontenta pri la sumooj. Mi pensas ke estas bonega ideo. Ĉar mi devas legi en Esperanto kaj mi bonegas ĝin. Mi legis kaj legas

ankaŭ interesajn librojn ke mi ne trovas en la franca.

Mi ankaŭ vidas ke estas multaj da esperantistoj cxar viaj sumooj havas multe da partoprenantoj. Tiuj esperantistoj estas en la tuta mondo. Amike.

Bonan vesperon el belgio, sinjoro Hori.

Danke viaj sumooj mi legis facile vian retan broŝron. Ankoraŭ dankon al vi. Mi nun konas pli da vortoj en Esperanto kaj mi legas pli facile.

Mi legis ankaŭ la ateston de la brazila sinjoro. Mi pensas, ke sumoo havas ankaŭ fejsbukan paĝon. Oni povas ankaŭ diskuti tien pri la libro, kiun oni legas kun la aliaj esperantistoj.

Nun mi havas ideon : mi kontaktas grupojn de esperantistoj de la aliaj landoj, kiuj estas sur fejsbuko por ke ili iĝu miaj geamikoj. Do, miaj belgaj geamikoj vidas, ke kun Esperanto oni povas koni geomojn en la tuta mondo. Amike,.

16. Kelli (Brazilo)

De kelkaj jaroj mi partoprenas en E-Sumoo. Mia amikino Roze kaj mi volis partopreni en ĝi, do iun tagon ni interkonsentis komenci niajn legadojn kune. Ĝis hodiaŭ ni daŭrigas. Persone, mi ŝatas partopreni pro du kialoj, nome, unu, ĉar mi ŝategas legi, la alia estas, ĉar tiu legado estas ligilo, kiu ligas min al Esperanto. Ankaŭ mi gxojigis ekkoni S-ron Hori rete kaj rimarki, kiel engaĝita li estas al Esperanto kaj al sociaj aferoj, mi ŝatus sekvi lian ekzemplon. Mi ankaŭ estas feliĉa, kiam alvenas la dekkvina tago kaj mi sukcesas venki. Fakte nur unu foje mi malsukcesis, sed malsukcesi kaj daŭrigi ankaŭ estas parto de la procezo. Fratan brakumon,

17. Montaro (Rusio)

1. Kio min koncernas, sumoo devigis kaj devigas min legi la librojn, kiujn, verŝajne, mi neniam legos...
2. Nuntempe, tio estas fadeno, kiu konektas min kun la ekstera mondo, ĉar mi ne havas eblecon vojaĝi eksterlanden.
3. Mi ricevas interesan informon de sinjoro Hori Jasuo pri diversaj eventoj en lia lando (kun liaj mirindaj desegnaĵoj) kaj el aliaj fontoj.
4. Mi ekscias, kion legas aliaj esperantistoj, kaj tralegante iliajn recenzojn, mi povas imagi pri kio temas en la libro kaj ĉu ĝi indas legadon (ĉu iĝos interesa por mi?) kaj ĉu mi povas trovi ĝin por mi.
5. Mi vidas en la listo sufiĉe multajn esperatistojn, kiujn mi persone konas aŭ renkontis sur la interreto.

6. Mi preskaŭ ĉiam ekscias ion novan de miaj prizorgantoj kaj interŝanĝas kelkajn vortojn kun ili pri diversaj aspektoj de nia vivo.
7. Mi vidas esceptan atingon de sumoo, kiu instigas nin perfektigi aŭ subteni nian nivelon en Esperanto. Ni ĉiuj bezonas legi librojn (preferinde paperajn) en nia komputila mondo!
8. Komunikado per interreto donas al ni novajn avantaĝojn por disvolvii nian cerbon, konatiĝi kun diversaj kulturoj, aŭdi malsamajn opiniojn. Ĉio ĉi devigas nin pensi pli profunde kaj pli ofte, kio okazas en la mondo, fojfoje ĉi tio permesas al ni diferenci de la kutimaj stereotipoj, kiujn ni spektas/aŭdas, /legas en la fontoj de nia propra lando.
9. Sumoo helpas plifortigi amikecon inter popoloj, batali por paco kaj plibonigi reciprokan komprenon.

18. Aleksandro (Rusio)

Mi havas kutimon ĉutage ion legi. Sed por Esperanto-Sumoo mi ordinare serĉas libron kun ne malpli 150 paĝoj. Legante librojn mi ekscias tion, kion ne sciis, konatiĝas kun verkoj de alilandaj aŭtoroj. Ankaŭ interese legi ion verkitan rekte en Esperanto. Mem ideo de Esperanto-Sumoo estas bonega, ĉar ni devas praktiki la lingvon kaj komuna legado de Esperanto-literaturo devas esti en ĉi tiu mondo.

Sanon kaj dankon pro via granda laboro!

19. Yu (Ĉinio)

Post kiam mi aliĝis al sumoo-lego, fulme pasis jam dek jaroj. Mi dankas "E-sumoon", dankas sinjoron Hori Jasuo, kiu kuraĝigas kleriĝon de esperantisto, dankas ĉiujn prizorgantojn, kiuj donas tempon kaj energion por ke nia lego estu pli kaj pli bona, orda kaj prospera.

20. Hirundo-Olga (Ĉeĥio)

Saluton sinjoro Jasuo. Ĝenerale mi ŝatas legi, kaj ion legas ĉiutage. Do Sumoo estis por mi oportuna kaj bona afero. Sed legado de fremdlingvaj libroj postulas aĉetado de librojn (ofte multekostajn), kaj tempo. Mi legas facile kaj sufiĉe rapide, sed multaj esperantaj amikoj diris ke por legado ili ne havas tempon. Eble mi eraras, sed oni ne povas bone posedi lingvon, se oni ne legas en ĝi. Ekzistas multaj lingvaj rondetoj, paroligaj kursoj, interpreta instruado, k.t.p, kiuj povas esti pli oportunaj por junuloj, sed ne pro aĝuloj. Sumoo taŭgas por ĉiuj. Iu bezonas pli da komunikado, ĉar en multaj lokoj malaperis vivaj esp.lingvokusoj. Reta instruado ne por ĉiuj sufiĉas. Por mi Sumoo estis bona ebleco kontiĝi kun interesaj homoj, bona memor'trejnado, kaj devigis min pli ofte legi esperante (ní ĉiuj scias, ke legado en naciaj

lingvoj estas pli facila). Tial mi tre dankas al sinjoro Jasuo pro lia bonega ideo.

21. La Revanto (Bulgario)

Mi iam ladas vian bonegan iniciaton legi librojn en Esperanto. Tio donas al ni eblecon lerni novajn vortojn, plibonigi niajn lingvo- kaj literaturajn konojn. Dankon pro la ebleco partopreni. Tio estas vere tre utila por Esperanto agado!

Sincerajn salutojn

22. Jitka (Italio)

Mi bone scias, ke vi havos en monato decembro naskiĝtagon. Vi vivos ne nur ĝis la 100-a SUMOO, sed vi atingos ankaŭ 100-jariĝon - vi certe vivos cent jarojn. Esperantujo bezonas vin.

Sumoo evidentĝxas bonega luktado, ĝi helpas al unuopuloj plibonigi sin mem.

Kiam mi sciiĝis pri ĝi, mi tuj aliĝis. Mi estas kontenta partoprenadi ĝin.

Dankon por la ebleco.

23. Vojaĝanto (Nepalo)

Gratulon al s-ro Hori Jasuo, kiu estas inteligenta patro de Sumoo. Li nur ne estas Esperantisto, li estas tre brava motoro kaj brila suno de Esperanto-movado. Mi povas imagi, ke daŭre kaj senlace li laboris, laboras kaj laboros dum longa vivo. Mi esperas, ke lia vivo ne estos normala, ĉar li estas unika viro, kiu ĉiam vivas ridema, laborema, helpema kaj amikema.

Li verkis multajn librojn pri lingvo, kulturo, vojaĝo, homaro kaj tiel plu. Estas mirinde, ke li sukcesis unigi amason da geesperantistoj de la mondo por partopreni en SUMOO por ke ĉiuj homoj daŭre kaj facile povas legi Esperantajn librojn. Samtempe oni povas praktiki Esperanton.

S-ro Hori ne estas nur simpla Japana viro, ĉar li ankaŭ estas frato, dumviva amiko de ni ĉiuj. Fakte estas tre malfacila laboro, ke daŭre sendas informojn, interesajn bildojn, pentraĵojn, iniciativojn ktp. Li ĉiam volas vastigi Esperanto-movadon en la tuta mondo. Ni devas havi kuraĝon oficiale instrui Esperanton en lernejoj kaj universitatoj por ke Esperanto lingvo neniam malaperos de la homaro kaj mondo.

Kolekti "Voĉojn el la mondo" estas lia alia rimarkinda laboro. Ankaŭ tio estas neforgesibla kaj inteligenta laboro de li. Li sukcesas fari tre multan laboron kaj mi dubas, ĉu li ĉiunokte sufiĉe dormas sur la lito. Sendube li estas merita juna Japana viro, kiu nur pasas pli ol 75 jarojn

kaj mi vere esperas, ke li vivos pli ol 150 jarojn.

Ni Sumooistoj kune devas gratuli al respektinda amiko s-ro Hori Jasuo kaj lia familio por lia senlaca memorinda laboro.

Vivu Esperanto! Vivu Sumooooooooooooo :-)

Estas mia plezuro danki al li por ke li vojaĝis al Nepalo por partopreni en Internacia Himalaja Renkontiĝo kaj Speciala Eskurso en diversaj turismaj lokoj de Nepalo 20 fojojn. Oh! Neniu povas imagi, ke unu Esperantisto kaj turisto, kiu vojaĝas 20 fojojn en sama lando kaj denove volas vojaĝi al la lando, kiu havas plej altan montaron Mt. Everesto kaj naskiĝlokon de Budho !

Mi elkore aplaŭdas por s-ro HORI. Ĉiam estu felica, sana, ridema kaj verkema. Ni ĉiam vojaĝu kun li. Nun, kun amo mi forte brakumas lin.

24. Song Ping (Ĉinio)

Ni ne havas ajn opinion pri Sumoo. Ni devas daŭri, daŭri, legi, legi, Dankon el Song Ping

25. Samo (Japanio)

Aparte de la komentoj pri Sumoo-legado mi nur maltrankviliĝas pri la longedaŭreco de la Sumoo. Nuntempe ni dependas de s-ro Hori pri ĉia administrado de Sumoo. Ni devas konsideri pri la daŭrigo de la Sumoo. Kiel daŭrigu la administradon de la Sumoo mi nun maltrankviliĝas. (Samo)

26. Daniel Kanlipou (Ganao)

Kara Yasuo, mi pensas, ke Sumoo estas bona iniciato, kiun vi organizas por helpi nin alkroĉiĝi al niaj programoj! Do mi esperas partopreni pliajn venontfoje.

Koran dankon pro via iniciato.

Elkore salutas vin.

27. Angel Arquillos

La plej grava helpo por plibonigi miajn konojn pri Esperanto estas Sumoo, mirinda ideo de Hori Jasuo, ĉar mi legis pli ol dek du librojn kaj mi esperas legi pli kaj pli, ĉar estas granda plezuro malkovri la komplikan kaj samtempe facilan tradukadon de famaj verkoj kaj malkovro de bonegaj originaloj.

28. Anna (Britio)

La Esperanto-sumoo estis brila ideo de Hori Jasuo, kiun mi ofte rekomendas al miaj lernantoj. Tamen ĝi ne estas nur por lernantoj - efektive mi mem regule partoprenas en ĝi, same kiel aliaj spertaj

esperantistoj. Ĉar la partoprenantoj rajtas mem elekti sian libron kaj la nombron de paĝoj, ĝi estas taŭga por ĉiuj niveloj. Komencantoj povas elekti tre facilan libron, ekzemple "Gerda malaperis", kaj legi nur unu paĝon tage. Sperta leganto povas elekti pli malfacilan libron, ekzemple "Mi stelojn jungis al revado" kaj legi 8 aŭ 10 paĝojn tage. Tiel, ĉiuj povas elekti libron kaj legokvanton laŭ la propra nivelo. Danke al la Sumoo, mi mem legis plurajn librojn, kiujn mi normale ne kuraĝus komenci, ekzemple "Fundamenta krestomatio" kaj "La danĝera lingvo".

Respondo de Hori : Kiel eldonisto kaj verkisto Sumoo estas tre bonvena. Mi estas tre ĝoja, sciante, ke iuj legas miajn librojn. Certe vi havas saman opinion. Sen legantoj verkistoj estas nenio. Kun bonaj legantoj verkistoj kreskas. Jasuo

29. Elmir (Brazilo)

Kara HORI, saluton!

Esperanto-Sumoo estas por mi nekomparebla rimedo instruigi gelernantojn serĉe de vortoj en vizitoj al E-vortaroj kaj sekve de tio venas la plibonigo kaj kreskigo de vortprovizo krom aliaj bonfaroj, ĉar, ekzemple, mi instigas ilin ĉiam legi laŭtvoĉe, do jen pli bona prononcado de la lingvo.

Dankon Hori!

30. Paco (SLOVAKIO)

Esperanto-Sumoo instruas al ni regulecon. Ĝi verŝajne estas la sola tutmonde regula E-agado. Verŝajne neniu alia tiaspeca ago funkcias en la mondo. Mi admiras la persistemon de Hori Jasuo.

Respondo de Hori : Kara Paco, dankon. Ial mi estas tre persista en diversaj aferoj. Mi kredas, ke persisteco estas la plej granda motoro por sukceso. Jasuo

31. Nikol (Francio)

kara Sumooamiko Jasuo, mi provas doni etan opinion. Dankon pri la tuton, pri la inventon, pri la daŭrigon de Sumoo Esperanto.

de kiam mi komencis (pli da unu jaro) mi sukcesis legi multe pli ol antaŭe, Plie mi sukcesas fari recenzon (kelkfoje tro malfrue, sed tamen)!

ĉiufoje mi legas 2 foje (libro proksimume 100 paĝoj). unuan fojon rigardante ofte vortaron, 2an fojon, kiam venos la daton, mi legas normale.

tiam mi progresas en esperanto. Mi deziras plu progresi, sed miaj

okuloj ofte ne volas, ĉefe antaŭ la ekranoj. estas kial mi ne ĉiam povas eĉ legi « Voĉoj el la Mondo »n, ktp.

ankaŭ mi ne forgesas la ptizorgantojn.

por vi, kara Jasuo Hori, mi deziras multbonajn, por ke Sumoo vivu longe dankal vi, kun kaj post vi, kaj tial ĉar ĝi estas necesa kaj perfekta por nia lingvo = eta miraklo.

(2 fojoj mi sukcesis rigardi la librojn legi de ĉiuj), estas stimula !)
dankon, dangegon, dakegegon.....)